Arthur Schopenhauer havis profundan aprezon pri soleco, taksante ĝin kiel esencon por intelektan kaj spiritan sendependecon atingi. Li kredis, ke la plimulto de homoj estas influata per la kondutregularo kaj socia interago, trudataj de la socio. Tiaj regularoj deturnas nian atenton de pli profunda pensado kaj kompreno de nia ĉirkaŭaĵo. Laŭ lia vidpunkto, soleco ebligas la individuon por liberigi sin el distriĝo, kaŭzata pro la vivado en socio. Tia agado ebligas nin kulturi nian saĝecon, kreemecon, kaj internan pacon.
Schopenhauer inklinis al la koncepto, ke soleco servas al ni, kiel sekuran lokon pro tio ke, la konstanta vivado en socio estas fonto de senrezona neceso kaj enuo.
Dume, laŭ Budaismo, ofte soleco estas rimedo por profundigi nian meditadon, kaj mem vidpovon. Buddha, efektive forlasis socion por iluminiĝi. Kutime, monaĥa vivmaniero emfazas la staton de iu estanta sola por la spirita praktikado.
Krome, Taoismo estimas solecon kiel maniero por nia ekzistado kongrui kun la natura movo de tio, nome Tao.
Samtempe, Kristanismo enhavas komplekzan instruon rilate al soleco. En Marko 1:35, Jesuo ofte apartigi sin de la aliaj por preĝado.
Miaopinie, soleco povus esti rimedo por iluminiĝi, kaj trovi pacon. Tamen, mi agnoskas la malfacilecon por ĝia praktikado. Sed, ankaŭ indas rimarki, ke nuntempe ĝenerale pli malpli la junularo preferas aliajn rimedojn por interkomunikado, ekz: sociaj retoj. Tio, miaopinie sugestas la inklinon al la forlaso de la persona interkomunikado. Tia ideo, kvankam kontraŭa al la kutima psikologia nocio, estas pensiga, ĉu ne?